

Enskribo

pri la unua komitata kunveno okazinta la 29an de januaro 1963 en la klubejo en hotelo Slovan. Komenciĝis je la 19.40 h. Ĉeestis ges-anoj Vondroušek, Friedrich, Prof. Scheiber, Dro Šikula, Borkovec, Lorková, Kořínek, Vaverková, Němec, Bednařík, Kalina. Post malfermo invitas s-ro Vondroušek s-anon Kořínek tralegi la sekretarian raporton por la proksima ĝenerala kunveno. Post la tralego de la raporto oni rekomendas en tri punktoj ĝin ankoraŭ kompletigi kaj oni aprobas la raporton. Poste prezentas s-o Borkovec la kasistan raporton. Laŭ ĝi estis enspezoj de la Rondeto en la pasinta jaro 3548,- Kčs, elspezoj estis 3309,14 Kčs kaj ĉ. 130,- Kčs restas nun sur la ŝparkasa konto. S-o Vondroušek diris ke la Kultura kalendaro nur hodiaŭ aperis kaj tial eblas nur nun kunmeti la printempan programon kaj oni antaŭvidas la dissendon de la programoj dum la venontaj 14 tagoj. Per ili oni ankaŭ invitos al la ĝenerala kunveno, kiun oni decidis okazigi post 14 tagoj. S-ano Vondroušek invitas ĉiujn anonci siajn prelegojn kaj kontribuojn al la programo. Poste oni diskutis pri la okazigo de la maskobalo preparata por la 23a de februaro. S-o Kořínek proponas, ke oni invitu por la balo samtempe kun la dissendo de la programoj. S-o Vondroušek petas, ke oni klupodu trovi konvenan kapelon por la balo, ĉar la antaŭvidita kapelo de SNB jam disfalis. Finite je la 20.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la Ĝenerala Kunveno okazinta la 12an de februaro 1963 en nia klubejo – Spegula Salono en hotelo Slovan. Ĉeestis 27 gesamideanoj kaj la reprezentanto de Parko de Kulturo kaj Ripozo k-do Sklenář. Malfermis s. Vondroušek bonvenigante k. Sklenář kaj petas s-anon Kořínek prezenti la sekretarian raporton. Post ties tralego ĝi estas aprobita de la ĉeestantoj. Poste s-ano Borkovec prezentas la kasistan raporton kaj s-ano Ballay la bibliotekistan. Ambaŭ ricevas absolutan aprobon. K-do Sklenář alparolas la ĉeestantojn, dirante, ke li volas nin fidi kaj helpi ĉiel. Ankaŭ koncerne la bibliotekan ŝrankon li esperas trovi solvon en tio, ke la libroŝranko povus ree lokiĝi en konvena ejo en la domo de PKR en Roosevelt-strato. Li interalie komparas nian rondeton kun alia en PKR – tiu Patruj-Ekkona (Vlasivědný kroužek) kun semajnaj kunvenoj viziotataj de ĉ. 200 personoj, kaj li konstatas ian malfloradon de nia rondeto. Poste estis paŭzo, dum kiu foriris k. Sklenář. Post la paŭzo anstataŭ la elficiĝinta estraro de la rondeto transprenas la gvidon s-ano Opletal. Li petas proponojn pri la elektota prezidanto. Estas pluraj proponoj ree por s-ano Vondroušek kaj post unuanima voĉdono li estas ree elektita prezidanto kaj transprenas la pluan gvidadon de la kunveno kaj prezentas la preparitan kandidatliston de la komitatoj post dufoja tralego de la kandidatlisto kaj neniam modifproponoj la listo estas en ĝia tuto ĉiesvoĉe akceptita. Estis elektita jena komitato: M. Adamcová, D. Konecká, M. Lorková, V. Podhradská, Z. Vaverková, Ambrož Jos., T. Borkovec, Aleš Bednařík, Kalina, Kořínek, Prof. Scheiber, Dro inĝ. Šikula, Jos. Ballay, Jos. Friedrich. Revizoroj M. Němec, S. Střelec.

Post la baloto estis diskuto. Venis proponoj kiel reaktivi la malnovajn ekziĝintajn klubanojn. S-ino Kaplerová proponas viziti persone pluajn centojn da esperantistoj en la kvartaloj. S-ano Kořínek proponas koncepti varbleteron aparte tiucelan kun detondebla demandkuponon resendebila al la rondebila kun kaŭz-indiko kial la koncernato ne plu partoprenas la kluban vivon. Estis interkonsentite sendi tian leteron en estonteco kaj ĉiel aktivigi kaj allogi la malnovajn esperantistojn.

Finite je la 21.45 h.

Enskribis Jiří Kořínek